

ATEISMO

BULTENO DE ATEISTA TUTMONDA ESPERANTO-ORGANIZO



Organizita religia varbado daŭras ankoraŭ hodiaŭ

(Bildo: John Eliot, puritana misiisto, varbcele predikas al masaĉusecaj indianoj)

Novembro 2023

VORTO DE LA REDAKTORO

En la antaŭa numero, mi finis la Vorton per rakontado pri miaj multaj flugoj ĉi-jare ligitaj kun translokigoj de mia patrino de Usono unue al Slovenio kaj sekve al Pollando. Mi skribis: “Mi ĝenerale sentas min pli trankvila nun, kvankam problemoj daŭras... Sed nun ŝi almenaŭ estas proksima, nur trans rivero, ne plu trans oceano.” Sentante min pli trankvila, mi fine permesis al mi du-semajnan ferion, la unuan semajnon pasigotan en Torino ĉe la UK (mia unua UK ekde sep jaroj), la duan en Svislando. La sorto tamen havis alian planon.

La vesperon de mia unua plena tago en Torino, la dimanĉon de la Inaŭguro kaj la Nacia Vespero, mi ricevis la novaĵon de la domo por pliaĝuloj apud Varsovio, kie nun loĝis mia patrino, ke oni portis ŝin al hospitalo – sed ili certigis al mi, ke ĉio estos en ordo. Mi tamen maltrankvilis, iris dormi kun la espero ke ĉio finiĝos bone, matene duŝis min, kaj apenaŭ elirinte el la duŝo, ricevis telefonvokon. Mi tuj sciis pri kio temas vidinte la ekranon: vokis la domo. Tiun matenon antaŭnelonge, dum dormo ĉe la hospitalo, forpasis mia patrino.

Kia ironio: mi alportis ŝin al Pollando por ke ŝi estu multe pli proksima, sed mi estis en alia lando, pli ol 1200 km for, kiam ŝi forpasis; mi loĝigis ŝin en domo por pliaĝuloj por ke ŝi havu bonan zorgadon kaj mi povu senti min pli trankvila, sed ŝi forpasis nur sep semajnojn post sia alveno al la domo. Mia patrino ja daŭre “estas proksima, nur trans rivero”, tamen ne en la domo por pliaĝuloj, sed kuŝanta proksime al ĝi. Pri ŝia funebro kaj ĝia religieco-laikeco mi rakontas ĉi-numere. Tiun ĉi numeron mi dediĉas al ŝia memoro, ĉar ja danke al ŝi mi estas Esperantisto (estis ŝi, kiu sciigis min pri Esperanto kiam mi estis knabo), kaj ĉefe danke al ŝi mi estas liberpensanto kiel ŝi.

En Torino interalie mi planis helpi ATEO-n ĉe la Movada Foiro, kion mi sukcesis fari. Tamen mi ankaŭ intencis ĉeesti kaj kungvidi la ATEO-kunvenon, kion mi ne povis fari ĉar mi devis tuj reveni al Varsovio. Luigi Garlaschelli, emerita sciencisto, senmaskiganto de mirakloj, faris interesan prelegon dum la kunveno – en tiu ĉi numero ni aperigas resumon, kiun li preparis, de lia parolado. Krom tio, vi trovos kiel kutime gamon de kontribuoj pri diversaj temoj verkitaj de ATEO-membroj, inter ili kelkajn tekstojn pri religia varbado/konvertado, kaj raporton pri la ATEO-kunvenoj dum la ĉi-jara Virtuala Kongreso. Finiĝas malfacila jaro, ne nur por mi persone, sed mondscale kiam furiozas militoj inter aliaj seriozaj problemoj. Ni povas almenaŭ senti kontenton, ke nia asocio kaj revuo iras daŭre antaŭen, iom lumigante en la mallumo.

ATEISMA VIVO

Rezisto al konvertado

Anna Lowenstein (Britio)


En 1941 la familio de mia patrino transloĝiĝis al nova domo en Manĉestro, en norda Anglujo. Montriĝis ke la posedantoj de la luata domo estas La Societo por la Disvastigo de Kristanismo inter la Judoj, kaj ke la loka reprezentanto de tiu asocio loĝas apude en najbara domo. La familianoj mem estis (relative) ortodoksaj judoj, kaj ili estis amuzataj de la ironio de la situacio. Ili ne sentis sin ĝenataj aŭ minacataj; male, ili trovis sian kristanan najbaron (kiu mem estis konvertiĝinta aŭstra judo) afabla homo, kiu tute ne provis trudi al ili siajn opiniojn. Do, ili loĝis apud li trankvile dum pluraj jaroj.

En tolerema lando kiel Britujo, judoj kaj membroj de aliaj malplimultaj religioj kutime ne sentas sin minacataj de misiista agado. Simile, oni trankvile povas anonci sin ateisto aŭ humanisto, sen timo ke tio povus rezultigi nedeziratan premon. La situacio estas alia en landoj, kie la vivo estas malfacila aŭ eĉ danĝera por homoj, kiuj ne apartenas al la reganta religio. En tiaj landoj la premo konvertiĝi estas multe pli forta, kaj homoj ofte cedas ne pro sincera konvinkiĝo, sed nur ĉar tio donas la rajton vivi sekure kaj partopreni en la vivo de la ĉirkaŭa socio.

Kvankam miaj gepatroj estis edukitaj kiel judoj, ili ambaŭ fariĝis nekredantoj antaŭ ol ili ekkonis unu la alian, supozeble dum siaj adoleskaj jaroj. Verdire, mi ne scias precize kiam aŭ kial ili faris tiun decidon, kaj mi nun bedaŭras, ke mi neniam demandis ilin pri tio. Mia patrino iam rakontis al mi, ke por ŝi la simbola

momento okazis, kiam en Jom Kipur – la plej sankta tago por judoj, kiam oni fastas dum 24 horoj – ŝi eniris kafejon kaj mendis sandviĉon.

Miaj gepatroj edukis min kaj miajn du fratojn kiel humanistojn – aŭ, pli ĝuste, ili ne aktive instruis al ni siajn opiniojn, sed kiel normale okazas, eĉ sen intenca instruado ni tamen ensorbis iliajn ideojn, kaj same kiel ili ni ĉiuj tri fariĝis



Eĉ laŭ fama infanlibro, ateismo estas erara opinio

humanistoj/ateistoj. Mi foje demandas min, kio estus okazinta, se mi estus devinta mem fari la grandan decidon forturni min de Dio. Ĉu mi estus havinta la kuraĝon? Iugrade mi bedaŭras, ke mi ne aktive mem faris la decidon, sed simple transprenis la opiniojn de miaj gepatroj.

Neniam oni perforte trudis al mi alian religion, sed mi memoras diversajn okazojn, precipe kiel infano, kiam instruistoj aŭ aliaj plenkreskuloj prezentis al mi kristanisman aŭ kredon je Dio. En la elementa lernejo kompreneble estis la kristnaska teatraĵo, kaj ŝajne la instruistino eĉ ne havis la ideon, ke mi ne devus partopreni. Mi, ses-jara, ludis la rolon de la anĝelo, kiu anoncas al la paŝtistoj, kie ili trovos la infanon Jesuo. Kiam mi fiere informis pri tio miajn gepatrojn, mi ne komprenis, kial ili ŝajnas neentuziasmaj. Kvankam ili ne parolis pri tio, iel mi estis konscia pri io stranga en ilia reago, kaj tio sufiĉe tuŝis min por ke la afero restu en mia memoro. Mi aldonu, ke ili tamen ne malhelpis min ludi en la teatraĵo!

Miaj gepatroj estis pli aktive ĝenataj, kiam mia frato aliĝis al la skoltoj. Unu el la agadoj de la skoltoj estis la “preĝeja parado”, kiam dimanĉe matene la tuta trupo, en siaj skoltaj uniformoj, paradis kune al la preĝejo kaj partoprenis en la diservo. En tiu okazo miaj gepatroj eĉ demandis sin, ĉu ili intervenu, sed decidis fari nenion. Mia frato travivis la sperton kaj restis nekredanto.

Mi memoras diversajn okazojn, kiam plenkreskuloj provis prezenti al mi religian starpunkton, sed tio neniam influis min. Ekzemple estis instruistino, verŝajne kiam mi estis naŭjara, kiu informis la klason pri la graveco de Dio. Laŭ ŝi, tiuj kiuj ne

kredas je Dio havas diversajn timojn. Mi levis la manon por informi ŝin, ke mi ne kredas je Dio kaj ke tamen mi ne sentas timon. Ŝi estis surprizita, kaj evidente iom embarasata. Tiutempe, ĉirkaŭ 1960, oni ne kutime anoncis sin ateisto, kaj verŝajne ŝi sciis nur, ke mi estas judo. Ŝi murmuris, ne tre konvinke: “Vi estas aparta kazo”.

Ĝenerale diversaj provoj dum mia vivo konvinki min pri la ekzisto aŭ graveco de Dio neniam efikis, eĉ kiam mi estis infano. Infanlibroj, precipe la klasikaj libroj el la pasinteco, ofte prezentas al infanoj religiajn ideojn, sed mi ĉiam senĝene legis ilin, sciante ke tiaj aferoj ne rilatas al mi. La kvar fratinoj en la fama usona libro *Virinetoj* de Louisa May Alcott estas tre religiemaj, sed tio por mi estis parto de tiu malproksima mondo de la pasinteco – mi povis ĝui la libron sen kundividi kun la fratinoj ties religian kredon.

Mi memoras alian libron, *La eta blanka ĉevalo* de Elizabeth Goudge, en kiu maljuna gubernistino rakontas al knabino pri la junulo, kiun ŝi amis antaŭ multaj jaroj – sed ŝi forlasis lin pro liaj bedaŭrindaj kaj eraraj opinioj: li estis ateisto. Mi tuj konstatis, ke mi kaj miaj familianoj havas tiun saman opinion, laŭ la aŭtoro “bedaŭrinda” kaj “erara”, sed tio ne ŝancelis mian certecon pri la praveco de miaj propraj opinioj.

Kaj efektive en infanlibroj oni legas amason da fantaziaĵoj, tamen ne supozante ke temas pri veraj aferoj. Ne okazas, ke leginte *Harry Potter* oni ekkredas pri magio. (Interese, tiuj, kiuj plej aktive kontraŭstaras la librojn pri Harry Potter, estas fundamentismaj kristanoj. Ŝajne ili pli ol nekredantoj sentas sin

minacataj de tiu nereala mondo.) Kaj kompreneble kiel infano mi legis la grekajn kaj skandinavajn mitojn, sed mi sciis, ke tiuj estas nuraj rakontoj, ne aferoj kiuj vere okazis. Same mi legis la rakontojn el la Malnova Testamento, sed tiuj por mi estis same fantaziaj kiel la grekaj mitoj.


Mi konstatas, ke mia patrino kiel infano certe havis similajn spertojn kiel mi. Kvankam ŝi tiam estis praktikanta judo, ŝi legis librojn, kiuj prezentis la kristanan vidpunkton, eĉ negative prezentis judojn. Tamen ŝi estis sufiĉe firma en sia propra identeco por ne esti tuŝata de tio. Supozeble tiaj spertoj devas firmigi en infano la konscion aparteni al malplimulto kaj esti neplene integrita en la ĉirkaŭa socio. Supozeble ili vekas skeptikismon eĉ en la menso de tiaj infanoj, kiaj normale akceptus senpripense la opiniojn de plenkreskuloj.

Konsiderante la premojn sur judojn

konvertiĝi al kristanismo, precipe en la pasinteco, mi konstatas, ke mi persone estas la produkto de generacioj da homoj, kiuj sukcesis reteni siajn proprajn kredojn kaj kutimojn eĉ en malamika situacio. Por fari tion ili devis rezisti eĉ perforton kaj aliajn minacojn. Sed eble la plej granda minaco por ili ne estis la premo konvertiĝi al kristanismo, sed la logo mergiĝi en la sekularan socion. Tion judoj faras de jarcentoj. En la tempo de la antikvaj grekoj multaj estis logataj de la greka filozofio. Same dum la ilumiĝo, multaj eŭropaj judoj forlasis siajn tradiciojn por aliĝi al la ekscitaj novaj pensofluo. Miaj prageavoj rezistis ĝis la lastaj generacioj, sed finfine miaj gepatroj fariĝis humanistoj, kaj mi mem edziniĝis kun nejudo – same unu el miaj du fratoj. Tiel tiu linio, daŭrinta jam centojn da jaroj, finfine rompiĝos – ne pro perforto aŭ devigo, sed tutsimple ĉar kredo je iu dio ne plu havas sencon en la moderna mondo.

PRIDUBU KUN KURAĜO EĈ LA EKZISTON DE DIO

THOMAS JEFFERSON



Vidpunktoj pri religia varbado

La redakcio de Ateismo petis kontribuojn pri la temo "Ĉu organizita religia varbado / konvertado ĝenas vin?" Jam unu pli longan artikolon tiuteman vi ĵus legis. Ĉi tie ni prezentas kvar mallongajn tekstojn, kiuj respondas al tiu demando. Ni ricevis ankoraŭ unu tekston tiurilatan, sed pli longan, kiun ni decidis meti en la sekcion "Ĉirkaŭ la mondo" ĉar pli ol simple prezenti sian opinion, la aŭtoro prezentas multe da interesaj aktualaj informoj.

Katja Lödör (Belgio)

Estante liberpensulo mi akceptas, ke aliaj homoj povas havi aliajn opiniojn. Homoj ŝatas disdividi siajn proprajn opiniojn, ĉu por ricevi konfirmon, ĉu por ekkoni la reagojn de aliopiniantoj. El tiu vidpunkto mi komprenas, ke homoj klopodas varbi sampensantojn same kiel ni esperantistoj klopodas varbi novajn parolantojn de nia lingvo. Ankaŭ ni estas organizitaj kaj pere de niaj organizoj klopodas disvastigi niajn idealojn. Mi supozas, ke por religioj tio validas same. Ĉio dependas de la maniero laŭ kiu oni klopodas varbi.

En la daŭro de la historio la religiaj instancoj estis tiom potencaj, ke homoj ne havis la eblecon elekti aŭ pridiskuti religiojn regantajn. Oni simple de la lulilo ĝis la morto estis devigata vivi laŭ la tiutempe reganta religio.

En la okcidenta mondo tiu religia premo pli-malpli malaperas depende de la lando. Rilate al Belgio kie mi loĝas, mi povas aserti, ke organizita religia varbado varias. Plejparte la ĉefaj religioj, kiel la katolika, nun klopodas reteni siajn adeptojn, sed ne trudas sin al aliaj homoj. Estas ankaŭ pli kaj pli da islamanoj, sed mi ne havas la impreson, ke ili trudas sian religion. Fakte estas nur malgrandaj sektoj, ekzemple la

Atestantoj de Jehovo, kiuj klopodas vendi siajn varojn de pordo al pordo. Tamen tio ne ĝenas min. Oni havas du eblecojn: inviti ilin por interparolo, diskuto, aŭ simple esprimi mankon de interesiĝo.

Do por mi varbado en si mem ne ĝenas, sed se mi spertus altrudon, tion mi ne tolerus.

Luis Ladeira (Portugalio)

Pri ĝi mi diras, ke religia varbado iom ĝenas min, ĉar ĝi celas daŭrigi tradician mistifikon. Tamen mi akceptas tion, ĉar tio fontas el la koncerna homa rajto, t.e. el la rajto al religia konfesio. Sed pri ĉi rajto oni devus disigi religion de moroj kaj moralo. La rajto al religio signifas nur kulti superan estaĵon, honori ĝin kaj peti ĝian protekton. La cetero, kiun la religemuloj ŝatas prezenti kiel aspektojn de religio, sed kiuj tamen ne estas, koncernas la rilaton inter la homoj. Kutime ili baziĝas sur uzoj kaj moroj de la pasinteco, preskaŭ ĉiam de patriarkaj kaj sklavaj tempoj, kiuj plurmaniere kontraŭas la homajn rajtojn. Tio estas la kialo, ke la religia varbado ĝenas min!

Franciska Toubale (Aŭstralio)

Responde al la demando "Ĉu organizita religia varbado / konvertado ĝenas vin?", mi preferas pensi ke konvertado ne plu estas trudita al iu ajn, kvankam varbado ja estas la vojo al konvertado. Mi diru, ke kiam duopo aŭ triopo de religiuloj trankvile staras ĉe la enirejo de butikcentro, antaŭ aŭto kun flugfolioj enmane, tio ne tro ĝenas min. Same kiel la aliaj aĉetontoj, mi ne aĉetos ĉion, kio estas al mi proponita, mi mem elektos. Do mi elektos paŝi preter ili aŭ halti por informiĝi, havi konversacion kun ili. Mi alte taksas buntecon de opinioj kaj kondutoj.

Sed kiam religiuloj pli agreseme provas influi la nekredantojn, mi konsideras ke ili trapasas limon. Dum la endomigo pro la pandemio la lokaj registaroj kuraĝigis homojn komuniki kun la najbaroj, la konatuloj, la izolitaj homoj, kompreneble sen fizike renkonti ilin. Tiam mi ricevis leteron de unu el tiuj religiuloj, kiu martelis, ke savado estas per Jesuo ktp. Vere kolerigis min, ke tiu persono elektis krizan momenton por provi arigi novajn diokredantojn. De kie li akiris miajn nomon kaj adreson, konsiderante ke la reguloj pri privateco estas severaj? Mi respondis, klare esprimante mian reagon, sed tio restis sen sekvo. Mi akceptus ricevi mesaĝon de homo, kiuj travivas specialan periodon, al homo kiu same devas alfronti defion pro la neatenditaj circumstancoj, sed ne "panegiron" al Kristo kun la celo instigi min konvertiĝi.


La pastroj de la preĝejo plej proksima al mia hejmo kunligis siajn strebojn kun tiuj de laika grupo, kiu organizas festojn kaj diskutojn pri la projektoj en la komunumo,

kun la celo havigi manĝaĵojn al tiuj, kiuj subite perdis sian laboron aŭ diverskiale ne plu povis nutri sian familion. Temis nur pri solidara ago, sen atendi ŝanĝon en la mensoj de la ricevantoj. Al mi tio spegulas kiel devas agi religiulo, kiu konkretigas la virton karitato, rekomendata de la plejmulto da religioj.

Bill Maxey (Usono)

Ĉar mi povas facile eviti ĝin, organizita religia varbado ne ĝenas min persone. Sed mi ja ĉagreniĝas pro tio:

- ke la amaso da religiaj homoj tute ne analizas siajn kredojn;
- ke tiom da romkatolikoj daŭre elektas subteni tiun hipokritan kaj senmoralan institucion;
- ke ne troviĝas pli da sekulara apogo por la multaj gejunuloj kiuj ne montras intereson pri religio;
- ke kristannaciistoj tiel sukcese trudas sin en ĉiujn sektorojn de la usona socio; kaj
- ke ateistoj ĉe ni ne sentas sin sufiĉe kuraĝaj por anonci sin.



Virtualaj ATEO-kunvenoj: ateistoj kaj moralaj reguloj

En novembra semajnfino okazis du tre interesaj kunvenoj de ATEO kadre de la ĉi-jara Virtuala Kongreso (VK) de Esperanto, nova evento kiu komenĉiĝis en 2020 kiam la UK estis nuligita pro la pandemio. La temo elektita por la kunvenoj estis: Ĉiu religio havas siajn skribitajn moralajn leĝojn, do ĉu ankaŭ ateistoj

(Ora Regulo, ordono kontraŭ perfortado de virinoj, ordono pri protektado de la naturo); la fakto ke la unuaj kvaraj ordonoj rilatas al la egoismo de Dio (ekz. “Ne ekzistu ĉe vi aliaj dioj antaŭ Mi”); kaj sekve la malalta rango de la ordono kontraŭ mortigado (nur la 6a). Kiel iu rimarkis, la Dekalogo respegulis sian epokon. Laŭ



Ateistoj diskutas moralon dum la ĉi-jara VK

bezonas skribitan liston de moralaj leĝoj? Kaj se jes, kiu havu la aŭtoritaton por verkitian liston kaj kiajn regulojn ĝi enhavu?

Granda parta de la unua kunveno fokusis ĝis je la fama Dekalogo de judismo kaj kristanismo el la Malnova Testamento. Estis kelkaj interesaj atentigoj pri la Dekalogo rilate al: la diversaj versioj kun malsamaj vicordoj; la evidentaj mankoj

unu el la kunvenanoj, la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj estas la moderna Dekalogo – tamen, oni rimarkigis, ke ĝi temas pri la rilato inter la ŝtato kaj la individuo. La prezidanto de ATEO atentigis, ke la Barata konstitucio estas ekzemplo de leĝaro sendia en tre religia lando, kiu listigas bazajn homajn rajtojn.

Krome, estis kelkaj aliaj trafikaj atentigoj de la partoprenantoj, nome: ke religioj estis necesa paŝo por la homaro en la pasinteco kaj ke ni heredis nian moralon de religio; ke laŭ la brita humanisma filozofo Julian Baggini, la bazo de moralaj estas konsentado kun aliaj homoj; kaj ke ankaŭ bestoj (kiuj ja ne estas religiemaj) havas iajn bazajn kondut-regulojn, kiujn oni povus nomi moralo.

La dua kunveno traktis pli ĝenerale la demandon ĉu ateistoj bezonas propran moralan leĝaron, nian propran Dekalagon. La ĉeestantaro ne provis verki ateisman Dekalagon. Jam komence estis forta esprimo de kontraŭo al skribita listo de reguloj: ni ateistoj ja estas malsamaj de religiuloj, ni malakceptas dogmojn, kaj kapablas konduti etike sen reguloj. Pluraj el la kunvenanoj konsentis, ke ateistoj ne bezonas skribitajn moralajn leĝojn. Trafe diris unu, ke surpaperigi moralon signifus religiigi ĝin. Tamen estis esprimita ankaŭ la kontraŭa opinio: ni vivas en socio, kun aliaj homoj, do ja necesas skribitaj reguloj ĉiuspecaj (eĉ parolante Esperanton, ni devas sekvi la 16 Regulojn!). Usona partoprenanto notis, ke multaj ateistoj en lia lando opinias, ke necesas morala regularo. Ili apartenas al kvazaŭ-eklezioj, kiuj subtenas etikon humanisman, kiel la Unitarianoj kaj Etika Kulturo. (Tio solvas la problemon de la aŭtoritato: ateisto mem elektu sian preferatan.)

Okazis diskuto pri la rilato inter ŝtataj leĝoj kaj moralaj leĝoj. Kunvenano atentigis, ke la neceso por sociaj viv-reguloj estas ĝuste la sfero de la civila leĝaro, kies ekziston ni ĉiuj akceptas – dum etiko, kaj la demando pri la neceso de skribitaj etikaj reguloj, estas aparta afero. Sampensa

partoprenanto forte emfazis, ke oni ne miksu moralon kaj juron ĉar ili estas tute malsamaj aferoj: la unua rilatas al la socio, la dua al la ŝtato. Sed laŭ alia vidpunkto, ŝtataj leĝoj ja iugrade respegulas moralajn leĝojn: ekzistas, ekzemple, leĝoj kontraŭ mortigado kaj ŝtelado, kvankam la leĝoj ne traktas, tute prave, diversajn moralajn aspektojn de la homaj interrilatoj (ekz. geedzaj).

Nesurprize, estis plena konsento, ke moralaj reguloj, ĉu skribitaj, ĉu neskribitaj, ne venas de Dio, sed de homoj, kaj ke religiuloj kaj ateistoj ĝenerale sekvas la samajn regulojn. La diferenco estas, ke ni ateistoj scias ke tiaj leĝoj estas homkreitaĵoj, eĉ se dum jarcentoj moralo estis konsiderata la sfero de religio, kaj ke la reguloj devus esti ŝanĝeblaj por adaptiĝi al sociaj ŝanĝiĝoj – io kio estis morala normo en antaŭaj epokoj povus esti netaŭga en la moderna mondo. Fine, estis konstato, ke tio, kion ateistoj vere bezonas, ne estas skribitaj moralaj reguloj, sed bonaj propagandaj materialoj kontraŭ religia trudado, kiu okazas konstante.

Raporto preparita de la Redakcio de Ateismo.



La skeptikisma movado kaj esplorado pri pseŭdoscienco

Toño del Barrio (Hispanio)

La kunveno de ATEO dum la Universala Kongreso en Torino rezultis en tre brila okazaĵo: ni ĝuis la ĉeeston de unu el la ĉefaj reprezentantoj de la skeptika alrigardo al religio, el scienca vidpunkto. La Esperanto-parolanta ĥemiisto Luigi Garlaschelli klerigis kaj samtempe amuzis nin per sia klarigado de la sciencaj eksperimentoj, kiujn li faris dum la pasintaj jaroj por ripeti plurajn tre konatajn supozatajn miraklojn en Italio (vidu lian artikolon ĉi-numere).

Garlaschelli estas unu el la plej konataj membroj de la *skeptikisma movado*, en Italio kaj tutmonde. Kaj mi pensis, ke tiu ĉi estas bona okazo por konigi la legantojn de la revuo pri tiu ĉi komunumo kaj ĝiaj klopodoj antaŭenigi la kritikan pensadon, kaj specife ilian rilaton al religio.

La vorto *skeptikismo* rilatas al maniero rigardi la realon per kritikaj okuloj, uzante la racion por penetri en la verecon de publikaj asertoj (la difino en PIV estas tro mallarĝa, kaj ne estas la senco en kiu mi utiligas la vorton tie ĉi). La skeptikismo havas longan historion, kaj granda parto de ĝiaj teknikoj estis uzataj por la kreado de la scienca metodo por koni la realon. Skeptikismo kaj scienco moviĝas manon en mano, kaj historie la skeptika alrigardo taŭgis por distingi inter asertoj faritaj laŭ scienca maniero kontraŭ senbazaj konkludoj, kies verecon oni ne sufiĉe pruvis.

Sed sciencaj asertoj ne ĉiam triumfas en

socio kies publika opinio ne ĉiam sekvas logikon kaj pruvojn. La malvero, foje intenca, foje ne, disvastiĝas en multaj tavoloj de la socio. La influo de la religio, tradicia aŭ novepoka, la baziĝo de publikaj politikoj sur emocioj, la neraciismo, ankoraŭ havas multan forton malgraŭ la faritaj progresoj. Multaj el tiuj malraciaj proceduroj eĉ alprenis la aperon de scienco, sen vere utiligi la procedurojn, kiuj donis al la scienca metodo sian fideindecon kaj potencon; oni parolas en tiuj kazoj pri *pseŭdoscienco*. Aliaj preferas diri, ke la fenomenoj okazas en specialaj cirkonstancoj, ne alireblaj al la scienca metodo, kaj aludas al ili kiel *paranormalaj*, aŭ, se ene de religia kunteksto, nomas ilin *mirakloj*.

Pro tio, en la lastaj jaroj diversaj personoj, kiuj celas pli racian aliron al la sociaj aferoj, kaj pli grandan rolon de scienco en decidofarado, organiziĝis por kontraŭbatali la malraciecon kaj la kreskon de la pseŭdosciencoj. Tiuj organizaĵoj, etendiĝintaj al multaj landoj de la mondo, konsistigas la *skeptikisman movadon*.

La plej konata el tiuj asocioj estas la usona *Committee for Skeptical Inquiry* (Komisiono por Skeptika Enketado, CSI, antaŭe CSICOP), fondita en 1976, kiu eldonas la revuon *Skeptical Inquirer*. Ekzistas multaj aliaj asocioj en diversaj landoj, plejofte uzantaj la vorton “skeptika” en sia nomo, sed ne ĉiam. En Francio la vorto uzata estas “zetetika” (france

zététique), dum en aliaj okazoj oni parolas pri *kritika pensado*. La italia asocio en kiu membras Garlaschelli estas konata kiel CICAP (*Comitato Italiano per il Controllo delle Affermazioni sulle Pseudoscienze*, t.e. Itala Komisiono por la Esploro de Asertoj pri la Pseŭdosciencoj).

Ekzemploj de pseŭdosciencoj

La kvanto kaj kvalito de aferoj, kiujn la skeptikisma movado kontraŭbatalas estas tre variaj, kaj ofte okazas, ke ne ĉiuj skeptikuloj aŭ asocioj fokusiĝas en la samaj kategorioj. Tio estas speciale atentinda en la kazo de politiko kaj religio, pri kiuj ni komentos poste.

Jen kelkaj ekzemploj de pseŭdosciencoj kaj paranormalaĵoj, kiujn tiuj asocioj kaj revuoj alfrontas.

Iuj asocioj fontis el kritika taksado al la raportoj pri eksterteranoj kaj t.n. “flugantaj teleroj”.

Kvankam temas ĉefe pri fenomeno pasinta, de tempo al tempo renaskiĝas la intereso pri eksterteraj vizitantoj kaj pri supozataj kaŝadoj kaj manipuladoj. Tamen, multaj iamaj interesiĝintoj prenis kritikan aliron, kaj poste formis la bazon por la skeptikisma movado (ja neniuj neas la eblecon, ke ekstertera vivo ekzistas, kaj fakte kelkaj el la fondintoj de la skeptikisma komunumo estis ankaŭ fondintoj de la astrobiologio kiel scienca fako).

Alia bona ekzemplo estas la astrologio, la kredo ke la steloj kaj planedoj influas nian

karakteron aŭ estontecon. Eĉ se oni povus trovi iujn meritojn historie, estas apenaŭ kredeble kiom populara tiu divenado ankoraŭ estas, kaj kiom da spaco ĝi okupas en amaskomunikiloj. La tasko de skeptikuloj estas montri la sensencon de astrologiaj asertoj, des pli kiam ili influas la faradon de decidoj, foje fare de gvidantoj kaj influhavaj personoj.

Alia celo de la esploro de la skeptikuloj estas la pseŭdomedicino. Diversaj metodoj estis disvolvitaj en la scienco por testi la medikamentojn kaj aliajn kuracteknikojn, tamen multaj nepruvitaj kuraciloj restas popularaj, kaj aliaj naskiĝis pro iniciato de sanigantoj kaj eĉ ĉarlatanoj. La skeptikisma movado estas speciale aktiva en kelkaj landoj en tiu kampo, por certigi ke la medicino estu bazita sur pruvoj kaj scienco, por pli bone protekti la sanon de la publiko.

Aliaj fakoj, kiujn oni submetas al kritika ekzamenado, estas la parapsikologio, la esoterismo, la pseŭdo-historio, pseŭdo-ärkeologio, kaj simile.

Politiko kaj religio

Kvankam tiuj kampoj menciitaj estas evidente alireblaj per kritika kaj scienca alrigardo, la skeptikisma movado estas tamen dividita rilate al du kampoj, en kiuj estas malpli evidente ke unueca taksado estas ebla aŭ dezirinda.



La unua estas politiko. Ĝenerale la skeptikismaj asocioj preferas resti neŭtralaj fronte al pure ideologiaj demandoj, sed en diversaj kampoj la organizita skeptikismo ja havas sian rolon. Ekzemple, oni certe devas kontraŭi la influon de religio en la sociaj aferoj. En tiu senco, grandajn penojn dediĉis la skeptika movado en Usono al la batalado kontraŭ la klopodoj enmeti la t.n. “intelligentan dezajnon” en la publikajn lernejojn de kelkaj subŝtatoj. Tio fakte estas varianto de la *kreadismo*, t.e. la ideo ke la mondon kaj la homon kreis inteligenta estaĵo, nome Dio. Oni ofte denuncis ankaŭ la influon de “spiritaj gvidantoj” aŭ de divenistoj super politikaj gvidantoj.

En la lastaj tempoj, la skeptikuloj fokusis atenton je la plimultiĝo de falsaj novaĵoj disvastigitaj, ĉefe pere de sociaj retoj, sen ajnaj pruvoj. Inter ili, la disvastigon de la obsedo pri imagataj konspiroj, t.e. la emoj vidi ĉiun socian fenomenon laŭ la vidpunkto, ke potencaj malhelaj fortoj tiras ĉiujn ŝnurojn (sen nei, kompreneble, ke realaj konspiroj efektive okazas en multaj kampoj).

Alia tikla fadeno estas la tiel nomata postmodernismo, tre influa en iuj sektoroj de la maldekstro, kiu, simpligante, asertas ke ne ekzistas universalaj veroj, kaj ke ĉio dependas de la identeca grupo al kiu oni apartenas. La aserto pri objektivaj veroj foje dividas la skeptikan movadon kaj foje estigas internajn kaj eksterajn polemikojn.

Ankaŭ rilate al religio, la skeptikisma movado ne estas tute unueca. Plej ofte, la organizita skeptikismo preferas ne eniri en tiun aspekton de la religio, kiu estas pli persona, pli spiriteca, aŭ kiu rilatas al tradiciaj ritoj sen sociaj konsekvencoj. Do,

oni ne povas identigi skeptikismon kun ateismo, kaj fakte iuj religiaj personoj partoprenas la skeptikisman movadon. Tamen, ekzistas konsento, ke la skeptika movado povas kaj devas esti pli aktiva kiam la religio havas influon en la socia kaj politika vivo, kiel antaŭe menciite.

Alia kampo de kritika konsiderado estas la asertoj de la religio, kiujn eblas studi science, ekzemple la mirakloj. En tiu ĉi kampo ekzistas diversaj studoj, kiuj esploris la asertojn de la religio. Ĝuste Garlaschelli estas unu el la ĉefaj tutmondaj esploristoj en tiu kampo, kaj lia prelego dum la UK estis unu el la plej bonaj ekzemploj de tio, kion raciismo, skeptikismo kaj kritika pensado povas fari por respondi al la senpruvaj asertoj de religiuloj kaj aliaj ĉarlatanoj.

Por scii pli

Ne estas multe da literaturo en Esperanto pri tiu ĉi movado, sed vi povas legi iujn ekzemplojn en mia persona retpaĝo, ĉe:

www.delbarrio.eu/eo.htm#SKEPTIKISMO.

PRIPENSIGOJ

Funebro tre proksima: inter religieco kaj laikeco

Nyegosh Dube (Pollando)

Dum la lastaj jaroj, oni multe parolas en mia senreligia komunumo, inkluzive en la paĝoj de tiu ĉi revuo, pri humanismaj ceremonioj diversspecaj – geedziĝaj, konfirmaciaj, funebraj – kaj ankaŭ pri “maldiservoj”. La ideo estas ke ankaŭ senreligiuloj havas bezonon por tiaj ceremoniaj, kiajn proponas la religioj. Ĉefe temas pri gravaj viveventoj, sed ankaŭ pri ĉiusemajnaj ariĝoj. Ni senreligiuloj serĉas ekvivalentojn de religiaĵoj. Nu, tre triste falis al mi la devo organizi la funebraĵon de mia patrino en aŭgusto ĉi-jare. Mi ŝatus en tiu ĉi artikolo dividi kun vi la etapojn de mia pensado pri la funebraĵo. Unue, mi prezentos iom da fonaj informoj.

Mia patrino ne estis ateisto, sed ankaŭ ne estis religiulo. Ŝi unuflanke konsideris ŝin agnostikulo. Sed aliflanke, ŝi ĉiam ankaŭ sentis sin ligita al ortodoksa kristanismo, en kiun ŝi estis baptita, kvankam ŝi ne ĉeestis ortodoksajn diservojn. Ĝis iu grado, ŝi tamen ankaŭ sentis ligitecon kun katolikismo. Miaj patrinaj geavoj naskiĝis en Kroatio, mia avo ortodoksulo kaj avino katoliko (ĝis la edziniĝo ĉar tiutempe estis kutime, ke la edzino konvertiĝis al la edza religio). Dum iu periodo, mia patrino ĉeestis katolikan lernejon en Kroatio (tiam parto de Jugoslavio) kaj ĉiam parolis pozitive pri la monaĥinoj kaj la kvalito de la instruado. Mi menciis, ke miaj geavoj estis ambaŭ nereligiecmaj. Mia patrino havis malfermitan sintenon, se temas pri religioj, vidante kaj bonajn kaj malbonajn aspektojn. Ŝi vivis 14 jarojn en Barato – hindua, sed samtempe plurreligia, lando.

Ankaŭ mia patro estis efektive agnostikulo, sed hindua agnostikulo. Do estis simetria situacio.

Bedaŭrinde, mi neniam parolis kun mia patrino pri la neevitebla forpaso kaj ŝiaj preferoj se temas pri funebraj aranĝoj. Ŝi pensas, ke ankoraŭ restas tempo kaj ke kiam venos bona okazo, ŝi enkondukos tiun malfacilan temon. Mi ankaŭ ne kaptis okazon por diskuti financajn aferojn. Nun mi scias, ke konsilindas fari tiujn aferojn pli frue anstataŭ lasi ilin al iu estonta momento. Malgraŭ ŝiaj diversaj sanproblemoj, mi pensis ke mia patrino, atinginte 89 jarojn en majo, atingos la aĝon de 90 kaj eble vivos ankoraŭ kelkajn jarojn. Ŝi estis, laŭ mia impresoj, rezista persono – ŝi travivis militon, kanceron kaj diversajn aliajn sanproblemojn. Dum pli ol 50 jaroj ŝi loĝis en Usono ĝis tiu ĉi jaro, kiam mi alportis ŝin al Slovenio (kie ŝi naskiĝis kaj pasigis multajn jarojn kiel junulino) kaj post tri monatoj al Pollando, kie mi loĝas. Mi loĝigis ŝin en bela, nova domo por senioroj* (kiu apartenas al la katolika Caritas, sed tute ne trudas religion), kie ŝi provizas 24-horan zorgadon. Bedaŭrinde, post nur sep semajnoj tie, ŝi forpasis en hospitalo, ĝuste kiam mi estis en Torino por la UK – mi ricevis la novaĵon de la domestrino lundon matene kaj merkredon revenis al Varsovio.

Mi deziris por ŝi belan funebraĵon, kun bela muziko kaj bela ceremonio. Mia unua penso estis ortodoks-kristana funebraĵo ĉar plaĉas al mi la kantado kaj la etoso de


**senioro – neologismo kun la signifo de pliaĝulo*

ortodoksa preĝejo. Mi esploris pri ortodoksaj preĝejoj kaj tombejoj en Varsovio kaj eksciis pri ortodoksaj ritoj, kiujn mi pensis netaŭgaj por mia patrino. Mia edzino kaj mi diskutis la eblecojn kun la funebra domo, kiu zorgis pri mia patrino. Ili sugestis, ke ni vizitu specifan ortodoksan tombejon, sed ankaŭ ke ni konsideru laikan funebraĵon kaj municipan tombejon. Aliflanke, la estrino de la senjora domo proponis ceremonion en katolika preĝejo kaj enteriĝo en katolika tombejo, ambaŭ proksimaj al la domo. (Ŝi sciigis pri interkonsento inter la katolikaj kaj ortodoksaj eklezioj, laŭ kiu ortodoksulo povas ricevi funebran ceremonion en katolika preĝejo kaj esti enterigita en katolika tombejo.)

La estrino menciis al mi, ke ŝi iam demandis mian patrinon ĉu ŝi preferus ke la kruco (kun Jesuo) super la pordo de ŝia ĉambro estu forprenita (memoru: ĝi estis domo de Caritas). Mia patrino respondis: "Kial? Lia protektado estas ĉiam bonvena!" Nu, tia estis mia patrino. Ŝi ja havis bonan opinion pri Jesuo, kredis ke li estis historia personeco, dum mi esprimis dubojn pri lia realeco. Fakte, ŝi kredis je ia forto aŭ energio en la universo, kiu eble estas Dio de la kristanoj kaj aliaj, aŭ kiu eble ekzistas en iu alia formo.

Formetinte la ortodoksan opcion, mi pripensis la katolikan opcion. Tamen mi baldaŭ alvenis al la konkludo, ke estus pli bone havi ceremonion, en kiu, anstataŭ la recitado de la kutimaj bibliaĵoj, oni parolu pri la vivo kaj karaktero de mia patrino, kaj

anstataŭ la ludado de la kutima preĝeja muziko, oni aŭdigu muzikaĵojn mem elektitajn. Nu, ĉio ĉi ĝuste eblas en laika ceremonio, gvidata de profesia ceremoniisto, anstataŭ de pastro. Do, mi verkis la tekston de la parolado (eŭlogio) kaj elektis muzikaĵojn kun la konsiloj de mia edzino. La ceremoniisto mem sendis liston de muzikaĵoj kun YouTube-ligiloj. Mi elektis sep muzikaĵojn, el kiuj tri estis por la ĉefa ceremonio. Du el la tri estis belegaj religiaj muzikaĵoj, la unua ortodoksa, kantata de serba ĥoro, la dua katolika, kantata de itala ĥoro – kaj la tria estis anglalingva kanto de kantistino, kiun mia patrino tre ŝatis. La aliaj kvar muzikaĵoj estis instrumentaj pecoj elektitaj el la listo, kiun mi ricevis de la ceremoniisto.



Laika ceremoniisto gvidas finan etapon de funebro en katolika tombejo

Do, la funebro kombinis religiajn kaj laikajn elementojn – laikan ceremonion gvidatan de ceremoniisto en laika ejo, la funebra domo (kvankam en la ĉambro estis kruco), kun religiaj kaj laikaj muzikaĵoj, kaj fine entombigon en la katolika tombejo proksima al la senjora domo kun bela

mallonga parolado de la laika ceremoniisto antaŭ la enterigo. Akompanis la enterigon muzikaĵo de Chopin kaj post la enterigo alian polan muzikaĵon klasik-stilan sed modernan. Ĉar ni estis en Pollando kaj mia patrino estis enterigota tie, estis taŭge havi muzikpecojn de polaj komponistoj.

La tuta funebro estis tre bela kaj mi estas kontenta, ke mi elektis laikan funebraĵon kun religiaj elementoj, ĉar mi pensas, ke

tiamaniere mi respektis la larĝan mondrigardon de mia patrino, kaj ankaŭ povis multe pli persone omaĝi ŝin, kompare kun tradicia preĝeja ceremonio. Eĉ estante ateisto, mi ŝatus pensi, ke ŝi iel daŭre ekzistas. Ŝia antaŭnomo Duŝanka devenis de la slava vorto por animo kaj tial la eŭlogio entenis la vortojn: “Ŝia animo povas vagi pace inter arboj kaj floroj, tra herbejoj kaj riveroj. Sed kien ajn ŝi vagos, ŝi restos en la koroj de tiuj, kiuj ŝin konis, precipe de ŝia filo”. Nu certe, ŝi restos en mia koro, en mia memoro.

Mirakloj laŭ la scienco

Luigi Garlaschelli (Italio)

Elstare sukcesa estis la publika kunveno de ATEO dum la UK en Torino. Ni invitis konatan skeptikulon, Luigi Garlaschelli, emerita profesoro de kemio ĉe la universitato de Pavia, kiu de multaj jaroj dediĉas sin al scienca esplorado de neklarigeblaj fenomenoj. Garlaschelli estas internacie konata pro sia esplorado de pluraj misteroj kaj ŝajnaj mirakloj. Sed krome li estas esperantisto, kiu eĉ verkis malgrandan prezenton de la Esperanta gramatiko en la itala. Tial li povis prezenti sian agadon en Esperanto. Multaj kongresanoj interesiĝis pri la kunveno. En la salono troviĝis ne nur membroj de ATEO, sed ankaŭ pluraj membroj de la katolika Esperanto-asocio IKUE.

(La redakcio de Ateismo)

Paranormalaj fenomenoj, misteroj kaj mirakloj

Paranormalaj fenomenoj malobeas la naturajn leĝojn, sed kiel scivolemaj sciencistoj, ni ŝatas esplori ĉu paranormalaj faktoj vere ekzistas, kaj ĉu ekzistas konvinkaj pruvoj pri ili. (La respondo, ĝis nun, estas "NE"). Fama usona "magiisto" kaj eskapisto, kiu nomiĝis James Randi, dum ĉirkaŭ 30 jaroj disponigis unu milionon da dolaroj por tiu, kiu kapablus ripeti paranormalaĵon sub kontrolo. Neniu sukcesis enkasigi tiun sumon!

Paranormalaj fenomenoj aperas malpli ofte, des pli zorge oni esploras ilin. Jen, ekzemple, kelkaj misteroj (ne ĉiuj estis paranormalaj) pri kiuj mi okupiĝis:

- Mi lernis la sekretojn de la fakiroj (kaj mi mem fariĝis fakiro): mi povas kuŝi sur lito

kun hirtaj najloj, mi manĝas fajron, mi manĝas vitron, mi povas haltigi la korbatojn, ktp.

- Mi ĉasis vaglumojn en tombejo.
- Mi okupiĝis pri la vera glavo en la ŝtono! (Mi eĉ eltiris ĝin.)
- Mi ekzamenis rabdistojn (homoj, kiuj asertas, ke ili povas trovi subteran akvofonton per forkbastono), sed ili ne sukcesis rimarki akvon fluantan en tubo.
- Mi kontrolis per eksperimento, ĉu homeopatio efikas aŭ ne ĉe kokinoj (ĝi ne estas efika).
- Mi enketis pri la sorĉaj ŝoseoj, kie veturiloj ruliĝas supren laŭ la deklivo (sed tio estas nur optika iluzio).

Sed ankaŭ mirakloj estas paranormalaj fenomenoj, kvankam ili okazas en religia sfero. Mi precizigas, ke ni sciencistoj ne

interesiĝas pri la aspekto de kredo: ni interesiĝas pri ekzamenado de la fenomenoj. En Italio ni havas multajn miraklojn, kaj mi esploris kelkajn el ili.

Miraklaj sangoj

La plej fama mistero, kiun mi esploris, estas la tiel nomata miraklo de la **sango de Sankta Januaro** (*San Gennaro*). Tiu "miraklo" okazas tri fojojn jare en la katedralo de Napolo, kiam la sango en ampolo mistere likviĝas. Kompreneble sango normale koaguliĝas, sed ne normale okazas, ke poste ĝi likviĝas denove, poste denove koaguliĝas, denove kaj denove. Ni reproduktis (aŭ imitis) tiun miraklon per kemia metodo. Temas pri ĝelo, t.e. gelatenaĵo, farita el fera klorido kaj kalcia karbonato. Tiun ĉi "tikotropan" ĝelon oni povas facile likvigi per malforta frapado kaj poste, kuŝante, ĝi denove solidiĝas. Dum la tipa ceremonio de la sangolikvigo, la ago, per kiu la abato kontrolas ĉu la likviĝo okazis, kaŭzas la plurfojan renverson de la portebla relikvujo, liverante tiel la necesan agitiĝon.

Alia mirakla sango estas tiu de **Sankta Laŭrenco** (*San Lorenzo*), en la urbo Amaseno (sude de Romo), kiu likviĝas la 10an de aŭgusto ĉiujare. Mi povis bone esplori ĝin: ĝi estas substanco, kiu normale estas solida, sed fandiĝas kiam la temperaturo superas 30 gradojn, kiel okazas dum somero. Jen mia reproduktaĵo per kokosa oleo kaj ruĝa tinkturo.

La kemian konsiston de la napola relikvo oni povus malkovri nur per malfermo de la ampolo, kiu entenas ĝin, sed kompleta analizo estas malpermesata de la Eklezio. Tamen, sufiĉus nur testi, ĉu la enhavo likviĝas per frapado aŭ per pliigo de la

temperaturo.

La resaniĝoj de Lurdo

Ni parolu nun pri la miraklaj **resaniĝoj de Lurdo** (*Lourdes* francalingve), kiuj devus esti la plej fidindaj, ĉar ili estis ekzamenitaj de tri komisionoj, du medicinaj kaj unu eklezia. Ekde 1848, oni agnoskis 70 oficialajn miraklojn. Sed oni devas konsideri la jenajn faktojn:

- En la unuaj 50 jaroj (1848 - 1909) okazis 38 resaniĝoj. Inter 1910 kaj 1959: 25. De 1960 ĝis 2009: 4 resaniĝoj. Tiel, la nombro da mirakloj konstante malpliĝas.
- En la unuaj 50 jaroj ekzistis nek iks-radioj nek veraj laboratoriaj analizoj, tial la diagnozoj de malsanoj estis tre necertaj.
- Eĉ la iama direktoro de la Bureau Médical de Lourdes, Patrick Theillier asertis:

"Malsanulo povas resaniĝi nur de malsano, kiu povas malaperi. La miraklo ne perfortas la Naturon. Neniam okazis, ke infano kun sindromo de Down resaniĝis en Lourdes. Konklude, tion kion mi nomas miraklon en medicinaj terminoj, oni povas nomi spontana malapero de la simptomoj.

- La procentoj de "neklarigeblaj" resaniĝoj en Lurdo estas la samaj kiel tiuj, kiuj okazas en hospitaloj, kiuj tamen estas malpli videblaj.
- La resaniĝoj neniam estas – kiel oni postulus por miraklo – tujaj, perfektaj kaj tute senkuracaj.
- Dokumentoj ofte ne sufiĉas kaj medicinaj testoj aŭ diagnozoj estas dubindaj (eĉ lastatempe, kiel en la kazo de la itala Delizia Cirolli).

- Plejofte temis pri funkciaj anstataŭ ol organikaj malsanoj (memsugestio kaj placebo).
- Ofte oni tro fidis la atestintojn.
- Kutime pasas multe da tempo antaŭ ol oni agnoskas la miraklon.
- Estas tre malfacile – aŭ tute neeble – por tiuj, kiuj volas esplori, akiri kompletajn klinikajn dosierojn.

La Mortotuko de Torino

La **Mortotuko de Torino** estas mondfama tuko el lino, kiun nuntempe oni konservas en la katedralo de Torino, kaj kiun katolikoj tradicie konsideras la tuko, per kiu oni vindis la kadavron de Jesuo Kristo. La aŭtentikeco de la relikvo estas kontestata. Laŭ kelkaj, ĝi vere estis la mortotuko de Jesuo. Laŭ aliaj asertoj, ĝi estas mezepoka falsaĵo. La Eklezio (teorie) tenas neŭtralan pozicion tiurilate kaj lasas la sciencistojn liberaj decidi.

La Mortotuko estas tuko el lino, granda 1,41 x 1,13 metrojn. Ĝi surhavas du-flankan malhelan bildon de viro torturita diversmaniere. (Spuroj de brulego krome markis la bildon.) Estas diversaj indikoj, ke la mortotuko ne estas aŭtentika:

- Veraj palestinaj mortotukoj el la 1a jarcento p.K. estis tute malsamaj. En tiu epoko la kadavroj estis ligitaj kaj oni uzis plurajn tukojn. Krome la tukoj estis el malsamaj materialoj kaj estis faritaj per malsama teksomaniero.
- Por fabriki la Mortotukon de Torino oni povis nur utiligi tipon de teksaĵo ne ekzistanta ĝis la Mezepoko.
- La Mortotuko ekaperis nur en la jaro 1355 en eta kapelo en Francujo. Tuj post



Luigi Garlaschelli prelegas
ĉe la ATEO-kunveno en Torino

tiu ekapero, oni ekspoziciis ĝin por allogi la pilgrimantojn kaj ĝi estis prezentata kiel vera. Pro tio, du episkopoj malpermesis la ekspozicion. (Ekzistas dokumentoj kaj la buleoj mem de la tiama papo.) Do, eĉ la Eklezio dum pluraj jarcentoj ne konsideris ĝin aŭtentika.

- En 1988 tri el la plej spertaj laboratorioj en la mondo datis ĝin per karbono-14. Rezulto: ĝi estas el la 14a jarcento.
- Vera homa korpo ne lasas spuron kiel tiu sur la Mortotuko: la spuro estas misformita kaj nenuancita, sed neta.

La Mortotuko estis pristudita en 1978 kaj oni determinis la karakterizaĵojn de la homa bildo. Resumante:

- La bildo estas malklara, nuanca, kaj ne misformita
- La bildo ne estas ŝuldita al pigmento (t.e. solidaj grajnetoj) sed al flaviĝintaj fibroj pro celuloza malkombino (termika aŭ kemia). La flaviĝo ekzistas nur sur la supraĵa parto de la linofadenoj.

Tamen, oni trovis mikro-spurojn de okro (= argila tero, kutime pulvorea, de flaveta

ĝis ruĝeta uzata kiel pigmento por farboj)

- La bildo montras “negativecon”: malkovrita danke al la unua foto en 1898 je la momento de la rivelado de la fotaj plakoj ĝi aperis kiel reala bildo, ĉar la elstaraj partoj de la vizaĝo fariĝas helaj kaj tiuj malpli elstaraj, malhelaj.

- La bildo ne fluoreskas

- La sangospuroj ne estas nuancitaj kiel la korpa bildo, sed netaj.

Ĉiujn tiajn karakterizaĵojn oni konsideras neklarigeblaj kaj nekreeblaj fare de artisto. "La Mortotuko estas “neebla” objekto, do miraklo."

Ĉu vere? Jen la hipotezoj por miaj eksperimentoj:

- La originala bildo komence devus esti pli videbla. Artisto ne kreus tre malfortan bildon.

- La Mortotuko estis kreita etendante tukon sur korpo, kaj frotante ĝin per seka okro.

- Por la vizaĝo oni uzis bareliefon por eviti misformaĵojn.

- Sangon kaj vipospurojn oni pentris poste.

- Kun la paso de la jaroj la pigmento degeneris.

- La malpuraĵoj entenataj en la pigmento produktis la supraĵan flaviĝon de la fibroj.

- Ĉi tiu procedo devus aŭtomate produkti pseŭdonegativaĵon, supraĵan malprofundan kaj malfortan bildon, sen distordo, kaj sen pigmento.

- La mikropsuroj de restinta okro, la manko de deformado kaj la karakterizaĵoj de la sangomakuloj estas klarigitaj.



Ceestantoj de la ATEO-kunveno
aŭskultas la prelegon

Miaj praktikaj provoj do estis la jenaj:

- Frotado sur reala korpo per okro, enhavanta spurojn de acido (por simuli pigmentajn malpuraĵojn).

- Uzado de bareliefon por la vizaĝo.

- Aldonado de vipmarkoj kaj sango per peniko.

- Bakado en forno (125 gradojn, 2 horojn) por simuli antikvecon, per mia "Maŝino por fabriki mortotukojn"!

- Lavado de la tuko por forigi la pigmenton.

- Aldonado de brulaĵoj, sangospurojn, ktp. La rezulto havas nuancitan bildon, nenuancitajn spurojn de sango, pseŭdonegativecon, supraĵan bildon pro flaviĝo de la supraĵaj partoj de la fadenoj, ktp. Do ne veras, ke la Mortotuko havas ecojn nereprodukteblajn!

Pliaj mirindaĵoj

En la katolika religio estas kazoj de **sangantaj hostioj**, kiel la miraklo de Bolsena (1263). Tamen, multaj similaj kazoj okazis ankaŭ sur pano, kukoj, ktp. kutime en la somero. Ekzemple:

- Sangantaj hostioj en Parizo (somero

1290); Bruselo (junio 1369 kaj julio 1379); Wilsnack, Germanio (Aŭgusto 1383); Sternberg, Germanio (julio 1492); Berlino (somero 1510);

- Sango sur kuko, Stennwitz, Germanio (julio 1693);
- Sango sur pano, Chalons, Francio (septembro 1792);



Klarigebla miraklo - la ripeta likviĝo de la sango de Sankta Januaro

- Sango sur polenta (manĝaĵo el maizo), Legnaro, Italio (aŭgusto 1819).

Nur en 1819 oni komprenis, ke temas pri mikroorganismo (*Serratia marcescens*), kiu kreskas sur nutraĵoj riĉaj je amelo, se la klimato estas varma kaj humida, kaj kiu produktas ruĝan pigmenton. Tiel naskiĝis mikrobiologio. La miraklo estas facile reproduktebla, se oni metas kelkajn gutojn de la kulturo *Serratia* sur tranĉaĵon de pano.

Plorantaj (kaj trinkantaj) statuoj

Kiel statuo povas plori? Kelkfoje estas naturaj klarigoj: malsekeco kondensiĝas, gluo de okulo fandiĝas, ktp. Ekzemple, en statuo de Padre Pio akvo kondensiĝis interne kaj gutis el fendo (el la kubuto!) Kelkfoje trompado okazas. Estis kazo en Sicilio de statuo ŝvitanta oleon. La polico kaŝis fotilon, kaj oni vidis, ke virineto

alvenis kun boteleto kaj verŝis oleon sur la frunton de la statuo. En ĉi tiuj kazoj necesus fermi la statuon en hermetika ujo, kun fotiloj kaj bona lumigado, por vidi, ĉu efektive ĝi plu ploras.

Fama kazo estis tiu de Civitavecchia, apud Romo (1995): statueto de la Madono ŝajnis plori larmojn el sango. Atestantoj vidis ĝin plori denove. Sed ĉiu atestanto raportis malsamajn aferojn, kaj fotoj montris, ke neniu sangogutoj aperis sur la vizaĝo de la statuo krom la unuaj. Krome, la sango estis vira, kaj la posedantoj de la statuo ĉiam rifuzis analizi sian DNA. Mi lasas la konkludojn al vi.

Eblas plorigi statuon sen tuŝi ĝin (tio estas tamen laboratoria artifiko, kion mi faris por televidaj intervjuoj). Temas pri kava gipsa statuo. La likvaĵo estas tenita en malgranda rezervujo kaj ĝi gutas el la okuloj. La truoj ne videblas, ĉar ili estas kovritaj de malgranda kvanto da gipso, kiu, estante pora, lasas la likvaĵon malrapide elliki post kelkaj minutoj.

En 1996 multaj statuoj en hinduaj temploj ŝajne trinkis lakton el kulero, kiun oni tenis al ties buŝo.

La 'miraklo' daŭris kelkajn tagojn. Tuj oni vidis, ke la lakto ne vere eniras la buŝon, sed fakte fluas laŭ la korpo de la statuo.

Ligoj

www.luigigarlaschelli.it

www.cicap.org

<https://sindone.weebly.com>

<https://skepticalinquirer.org/>

Luigi Garlaschelli estas kemiisto (nun emerita) kaj ano de C.I.C.A.P. (*Comitato Italiano per il Controllo delle Affermazioni sulle Pseudoscienze* – Esperante: *Itala Komitato por la Kontrolo pri la Asertoj pri Pseudosciencoj*).

LEGANTOJ REAGAS

Bibliaj legendoj en la lernejo

Anna Lowenstein (Britio)



Sen kono de la bibliaj rakontoj, kiel eblas kompreni klasikajn pentraĵojn? (Demeto de la Kruco - Tintoretto)

Iam mi renkontis junan usonan studentinon, kiu neniam aŭdis pri Merlino, la sorĉisto kiu konsilis la reĝon Arturo. Mi estis mirigita. Tutsimple mi supozis, ke ĉiuj anglalingvanoj rekonas la nomon de Merlino.

Eble oni povas pardoni al usonano ne scii pri Merlino, ĉar la legendo de Arturo ja devenas el Britujo. Kaj efektive mi mem kiel brito ne estas tre informita pri usonaj legendoj. Sed kion oni opinias pri eŭropano, kiu neniam aŭdis pri Jupitero aŭ pri la ligna ĉevalo de Trojo? Ĉu tiaj rakontoj ne estas parto de la ĝeneralaj

scioj de ĉiu relative klera homo? Kaj kion diri pri aliaj legendoj, tre gravaj en la eŭropa kulturo: Adamo kaj Eva, Noaĥo kaj la arko, la nasko de Jesuo ktp? Kion oni pensus pri homo, kiu tute ne konus tiujn nomojn, kaj neniam aŭdis tiujn rakontojn? Ĉu oni ne pensus, ke tia homo estas aparte malklera, sen la scioj, kiujn ĉiu ordinara homo devus havi? Sed kiel oni akiras sciojn pri tiuj legendoj? Kompreneble, en la lernejo, kie oni espereble ankaŭ renkontas la legendojn pri Trojo kaj pri la kavaliroj de la Ronda Tablo.

Tial mi komentis dum la pasintjara kunveno de ATEO, ke oni devus instrui la Bibliajn rakontojn en la lernejo. Mi menciis tion en la novembra numero de nia revuo de la pasinta jaro, kaj krome skribis: "... religio en la pasinteco estis tiel grava parto de la socio, ke necesas instrui ĝin en la lernejo – sed tio signifas instrui *pri* religio kaj religioj, ne kredi ilin."

Mi miris pro la pasia atako kontraŭ mia komento de Christian Rivière en la lasta numero de nia revuo, n-ro 36, de majo 2023. Li skribis: "Oni ne estas en lernejo por malŝpari sian tempon, sed por ricevi instruadon [...] Religio nepre estu kiel eble prisilentata, eventuale elvokata okaze de kurso pri historiaj faktoj." Li aldonis: "... mi ne komprenas kial 'kono de bibliaj rakontoj kaj de grekaj mitoj' estus parto de instruado..."

Sed kion oni lernu en la lernejo, laŭ Christian? Ĉu nur sciencon kaj matematikon? Ĉu ne literaturon kaj arton? Estus praktike ne eble kompreni tiujn fakojn sen almenaŭ iuj scioj pri la legendoj de la pasinteco – ĉu tiuj de la Biblio, ĉu tiuj de antikvaj Grekujo kaj Romo. Rilate al religio kiel fako, evidente mi ne proponas, ke oni studu ĝin por mem kredi ĝin. Sed ĝi ludis tiel esencan rolon dum la tuta pasinteco, ke estus neeble studi historion, se oni ne havus bazajn sciojn pri religio. Oni povas konsideri ĝin branĉo de filozofio: ĝi estas unu maniero interpreti la mondon, kaj en nia okcidenta mondo la plej grava ĝis la lastaj jarcentoj. Kiel oni povas kompreni la pasintecon, kiel oni povas kompreni aliajn manierojn pensi kaj vidi la mondon, se oni mem havas neniun scion pri religia pensado?

En sia artikolo Christian rakontas, ke li,

dekunujara, "...devis elteni, dum horoj laŭ pluraj monatoj, senĉesan prezenton pri tiuj neutilaj aferoj (interalie pri la 'grekaj mitoj', poste pri 'kristaĵoj')." Li ankaŭ mencias, ke kiam lia patro volis rigardi lian lernejan kajeron, "... mi tiom hontis pri la enhavo de tiu 'kurso', ke mi zorge formetis kaj kaŝis la koncernatajn paĝojn."

Ŝajnas al mi, ke tiu emocia reago estis ekstrema, kvazaŭ oni instruus pornografiaĵojn en la lernejo. Se infanoj ne devus lerni pri Moseo kaj Agamemnono en la lernejo, ĉu ili ankaŭ ne renkontu tie la verkojn de Ŝekspiro aŭ Molière aŭ Cervantes? Kiaj homoj ni estus, se ni havus neniujn sciojn pri tiuj famaj verkoj de la pasinteco?

En sia artikolo Christian citas la vortojn de la franca verkisto Victor Hugo: "La edukon donas la familio; la instruon ŝuldas la ŝtato". Mi ne scias, ĉu tiu preciza distingo inter edukado kaj instruado estas ĝenerala en la franca lingvo, ĉu nur ĉe Victor Hugo kaj Nicolas de Condorcet (franca filozofo kaj matematikisto menciita en la artikolo), sed ĉiuokaze tiu distingo ne ekzistas en Esperanto. Laŭ tiu difino, en lernejoj kaj universitatoj ne okazas edukado sed instruado. Kaj kiel klarigi la nomon de la konata Esperanta retejo edukado.net?

Ni tamen forlasu la lingvan diskuton, kaj koncentriĝu pri la kerno. Ĉu do estas tasko nur de la familio instrui tradiciajn rakontojn al siaj infanoj? Tio kaŭzus grandan malavantaĝon al infanoj, kies gepatroj estas tro malkleraj aŭ tutsimple tro okupataj por instrui tiajn aferojn al siaj gefiloj. Oni ne konfidas klerigadon de infanoj nur al ties gepatroj – kaj scioj pri religiaj legendoj kaj pri religio ĝenerale ja estas afero de klerigado.

Dio, kiu postulas adoradon, kaj la veto de Paskalo

Luís Ladeira (Portugalia)


“Adoru min por ke mi savu vin de tio, kion mi faros se vi ne adoras min!”

Kiam mi legis la 36-an numeron de *Ateismo* (majo 2023) la ĉi-supra citaĵo en karikaturu okulfrapis min memorigante la veton de la matematikisto Paskalo pri la ekzisto de Dio. La rilato inter la minaco de kolera dio kaj la veto de Paskalo supozigas, laŭ mia vidpunkto, infanaĝan edukadon de la sciencisto en religia etoso tia, en kiu estras koleriĝema kaj timiga superulo. Tute kredeble laŭ la epoko kaj socia kunteksto. La dio, pri kiu Paskalo vetas estas venĝema, ĉar se li ekzistas, kaj tamen iu ne kredas je li, tiu suferos eternan kondamnon.

Samtempe mi legis de Claude Piron *Dio*,

psiĉjo kaj mi en kiu psikoterapiisto (psiĉjo) demandas sciencesplore ekspacienton pri liaj spertoj/travivaĵoj koncerne superan enton. [La psikoterapiisto: “Kaj la devo kulti al Dio?” La ekspaciento: “...neniu devigas vin. Milionoj da homoj ne honoras Dion per kulto, kaj ĉu vi povas citi unu el ili, kiu estis pro tio punita?”]. La psikoterapiisto, kiu unue suspektis pri halucino, fine hezitas, ĉar evidentiĝis ke la ekspaciento tute ekvilibre mastrumas sian vivon. Certe la ekspaciento ne povus esti Paskalo! Eble tia dio prifajfus la veton de Paskalo.

Sed por analizi la veton ni citu Richard Dawkins el lia verko *The God Delusion* (La Iluzio Dio) (3a ĉapitro).



“La granda franca matematikisto Blazio Paskalo [Blaise Pascal] kalkulis, ke, kiom ajn povus esti la probableco de la neekzisto de Dio, estas eĉ pli granda malsimetrio en la puno por erara divenado. Prefere oni kreu je Dio, ĉar se oni pravas, oni povas akiri eternan feliĉon kaj se onimalpravas, tio tamen neniel faros diferencon. Aliflanke, se oni ne kredas je Dio kaj tio montriĝas malprava, oni ricevos eternan kondamnon, dum se oni pravas, tio ne gravas. Do la decido estas memevidenta: Kreu je Dio.

Tamen estas io klare stranga en la argumento. Kredi ne estas afero, kiun oni povas decidi fari ĉar tio estas pli oportuna. Almenaŭ, ĝi ne estas io, kion mi povas decidi fari kiel ago de volo. Mi povas decidi iri al preĝejo kaj mi povas decidi deklami la Nicean kredon, kaj mi povas decidi ĵuri sur stako da biblioj, ke mi kredas ĉiun vorton en ili. Sed neniu el tiuj agoj povas igi min vere kredi, se mi efektive ne kredas. La veto de Paskalo povus esti nur argumento por ŝajnigi kredon je Dio. Kaj tiu Dio, prefere ne estu de la ĉioscia speco, alie li tuj konstatus la trompon.

Sed kial, ĉiukaze, oni tiel volonte akceptas la ideon, ke la sola afero nepre farenda, se oni volas plaĉi al Dio, estas kredi je li? Kial kredado estas aparte speciala? Ĉu ne same verŝajne Dio rekompencus bonkorecon, aŭ malavarecon, aŭ humilecon, aŭ sincerecon? Kaj kio se Dio estas sciencisto, kiu rigardas honestan serĉadon de la vero kiel la plej supera virton? Efektive, ĉu la arĥitekto de la universo ne devus esti sciencisto? Ĉu vi vetus, ke Dio taksas malhoneste falsitan kredon (aŭ eĉ honestan kredon) super

honesto skeptikeco?

Sed krome, supozu, ke la dio, kiu alfrontos vin kiam vi mortos, montriĝos esti Baal, kaj supozu, ke Baal estas same ĵaluza kiel laŭdire estas lia malnova rivalo, la Eternulo. Ĉu ne estus pli bone se Paskalo estus vetinta por neniu dio, ol por la malĝusta dio? Efektive, ĉu la tuta nombro da eblaj dioj kaj diinoj, pri kiuj oni povus veti, ne malvalidigas la tutan logikon de Paskalo? Paskalo verŝajne ŝercis kiam li promociis sian veton, same kiel mi ŝercas en mia malakcepto de ĝi. Sed mi renkontis homojn, kiuj serioze prezentas la Paskalan veton kiel argumenton favore al kredo je Dio.

Ĉu eblas, finfine, argumenti por ia kontraŭpaskala veto? Se ni koncedas, ke ja ekzistas ioma probableco, ke Dio ekzistas. Tamen eblus argumenti, ke oni ĝuos pli bonan, pli plenan vivon, se oni vetos por lia neekzisto, ol se oni vetos por lia ekzisto kaj tial malŝparas sian altvaloran tempon por adori lin, oferi al li, batali kaj morti por li, ktp.”



Reago al “Pri la nocio de dio”

Luís Ladeira (Portugaliao)

“Budho, post la plena iluminiĝo (kio signifas, ke nun ĉio kristalklaras kaj nenio restas en tenebro), povis komplete konscii, ke ni homoj ordinaraj suferas ĉar ni ne scias, ke ni ĉiuj ankaŭ estas budhoj sed nun iluzias nin esti nur ordinaruloj kaj tial vivas mizere, ne tiel meritplene kaj brile kiel Budho, do pli ol dio!”

GIM In-hong, revuo Ateismo, majo 2023

GIM In-hong (kiu havas la Esperantan kromnomon “Ermito”), venigis al ni, ateistoj, diskuton pri la nocio de dio, emfazante ke la ordinara ne-nur-kristana koncepto pri dio kiel kreinto de la universo regas eĉ la mensoj de la ateistoj. Tamen, laŭ Ermito, la konceptoj pri dio ne elĉerpiĝas tiel. Tiam li aldonas budhisman ideon, kiu prezentas la diojn kiel entojn superajn al homoj, sed malsuperajn al budhoj.

Ĉi tie mia kompreno pri la afero ŝanceliĝis. Kiu estas Budho? Laŭ mia kompreno – eble mi eraras – Budho estas tiu, kiu luminiĝis, t.e., tiu Siddhartho, kiu malkovris la sensuferan vojon, sed ne nur Siddhartho, ankaŭ tiuj, kiuj luminiĝis/os post li. Por iĝi tiel, t.e., por iĝi budho, oni sekvu la vojon montrita de la unua Budho, kiu celas forigi la homojn el la vivsufera kondiĉo en kiu la homaro estis/as naskita.

Do Budho ne estas monda kreinto, sed nur tiu, kiu malkovris la vojon al sensufero. Tamen li ankaŭ ne estas supera dio, ĉar li estas nur homo, kiu luminiĝis elirante la sufervojn kaj malfermante pordojn al ceteraj homoj, kiuj siavice povas atingi la saman staton kaj fini la sinsekvon de eroj de vivsuferkateno kaj atingi la nirvanon, tio estas, ne plu reenkarniĝi, ne plu reveni al suferado.

Se tiel, kial Ermito diras ke “Budho eĉ malkonsilis adori Lin”? Se budho estas atingtavolo, ĝi ne estas enkarniĝo de dio. Pro tio, tiu ne nur malkonsilas adoradon, eĉ malpermesas ĝin. Tamen la ambigua frazo de Ermito iom malheligas la aferon: la pligrandigo de literoj “B” kaj “L”, kaj la uzo de la verbo “malkonsili” malklarigas la frazon.

Laŭ mia kompreno – eble mi eraras – budhismo ne adoras universan kreinton, ĉar ĝi estas ateisma. Oni rimarku, ke la dioj eĉ ne estas bezonataj por trovi la vojon al sensufero. Tiel, budhismo ne estas religio pro tio, ke ĝi ne postulas adoradon al dioj. *Ĝi estas etiko, kiu montras al homoj la vojon al feliĉo laŭ filozofia vidpunkto, kiu difinas la homan naturon kiel naturon sufereman, kvankam supereblan, t.e., ŝanĝeblan.*

Verŝajne ĉi tie postuliĝas klarigo pri la koncepto de religio. Laŭ mia vidpunkto, religio postulas superan forton – “Forto mistera”, “Potenca senkorpa mistero” laŭ esprimoj de nia kara Ludoviko – kiun homoj adoras kaj al kiu ili petas subtenon. Kompreneble tio supozigas superhomajn kapablojn, kiuj mastrumas la homan vivon. Budho ne estas tio, ĉar li homas; budhismo ne postulas adoradon, ĉar ĝi ne supozas supermastrumadon. Do, temas nek pri dio, nek pri religio.

Ĉu hazarde rigardi budhismon kiel religion venas el miksaĵo de budhismo kun politeisma hinduismo? Tamen tio, kion mi demandas, kiel la cetero de miaj ideoj pri budhismo, eble ŝprucas el mia miskompreno pri ĉi afero. Eble... sed mi suspektas ke oni povas esti ateisto kaj budhismo, ĉar iu ajn ateisto bezonas etikon.

ĈIRKAŬ LA MONDO

Ke Usono (r)estu kristana nacio

Bill Maxey (Usono)

Jes, sobraj Atestantoj de Jehovo kaj ridetantaj mormonaj misiistoj ankoraŭ rimarkeble plenumas siajn devigajn taskojn sur la stratoj de Usono, sed la pejzaĝo de religia varbado rimarkinde ŝanĝiĝas. La nuntempaj variantoj oni pli ĝuste nomus merkatico. Temas pri efikaj, profesie organizitaj strategioj, detale planitaj kaj celkonscie realigitaj.

Ne surprize, tiuj kampanjoj celas precipe infanojn kaj gejunulojn, kiuj troviĝas plej amase en publikaj edukejoj. En multaj lokoj, provante varbi infanojn, eklezioj aranĝas regulajn rondetojn en bazlernejoj post la lerneja tago. Pli ol 4 000 lernejoj gastigas t.n. Good News Clubs, kiuj utiligas materialojn pretigitajn de la internacia fundamentisma organizaĵo Child Evangelism Fellowship, kies “speciala misio...estas konverti ĉiujn infanojn...per la Evangelio de la Sinjoro Jesukristo”. Tiu programo instruas al junaj infanoj ke ili naskiĝis kun pekemaj koroj kaj suferos por ĉiam en la infero se ili rifuzos kredi. Ĝi emfazas plenan obeadon al Dio kiel la plej alta valoro.

Por akordi kun la Unua Amendo de la usona konstitucio, la lernejoj (same kiel aliaj publikaj institucioj) devas resti sekularaj. Malgraŭ tio, en multaj lokoj kun grandaj kaj tre konservemaj kristanaj majoritatoj, religiaj organizaĵoj foje sukcese efektivigas projektojn en lernejoj, eĉ kun la aprobo de la instancoj. Ekzemple, iu pastoro aranĝas prozelitisman prezentaĵon en lerneja halo serĉe al junaj konvertotoj aŭ preĝeja grupo proponas bibliajn

lecionojn dum la lerneja tago. Foje eĉ la edukistoj mem senhonte trudas religiaĵojn al siaj lernantoj: instruisto afiŝas bibliajn citaĵojn en la klasĉambro aŭ trejnisto preĝas kun siaj atletoj kaj devigas ilin vivi laŭ kristana maniero. Oni raportas centojn da tiaj deliktoj ĉiujare.

Aktuale, kreskanta nombro da familioj elektas sendi siajn gefilojn al unu el la ĉiam pli abundaj privataj religiaj lernejoj, ofte pro tio ke la gepatroj taksas la etoson kaj la instruprogramon de la publikaj edukejoj tro sendiaj aŭ neakcepteblaj “liberalaj”. Al la jam delonge ekzistantaj romkatolikaj lernejoj nuntempe aldoniĝas multaj aliaj, ofte konservemaj evangeliaj. Alia hodiaŭa tendenco estas eduki la infanojn hejme, elekto ja permesata laŭ ŝtataj leĝoj, kies postuloj rilate kvalifikaĵojn kaj ekzamenojn tamen tre malsamas.

Por kontentigi la bezonojn de tiaj lernejoj kaj hejminstruantoj, specialaj kristanaj eldonejoj kaj kristannaciismaj organizaĵoj disponigas ĉiuspecajn lernomaterialojn. En ties enhavo ne nur abundas bibliaj aludoj sed ankaŭ dubindaj, distorditaj aŭ eĉ neveraj historiaj aŭ sciencaj klarigoj kiuj kongruas kun la “kristana mondrigardo” sed ne kun la faktoj kaj teorioj jam delonge akceptataj de fakuloj.

Ĉe la universitatoj nun oftas novspecaj organizaĵoj kiuj esperas renovigi la velkintan religian senton de jam kristanaj studentoj kaj allogi aliajn ankoraŭ sen tia sperto. Sen aparta ligo al specifa konfeso, ili ĉefe klopodas konvinki la gejunulojn pri

la avantaĝoj de kristana vivado. Proponante plaĉe viglajn programojn kaj kreivajn amuzaĵojn, ili utiligas la efikan intimecon de kelkpersonaj grupoj kaj individua mentorado por tenti, kapti kaj reteni adeptojn.

Tiuj ĉi modernaj varbistoj ne plu emas emfazi la “savan povon” de Kristo sed prefere la eblon transformiĝi pere de “intima rilato” kun li. La membroj kunstudas la Biblion kaj serĉas la irendan vojon por si mem. Unu tia organizaĵo, CRU, kredas ke “Jesuo alportas la kialon, signifon kaj esperon al nia vojaĝo tra la vivo.” Alia, Intervarsity, difinas sin kiel “multetnan komunumon kiu klopodas koni Dion kaj konigi lin al ĉiu angulo de la universitata tereno, kaj finfine al la mondo.” Chi Alpha kaŝole anoncas: “Ni kredas je bona amuziĝado. Se esti kristano vere estas la plej bona viveblo (kaj ĝi ja estas), do ni ankaŭ devus plej bone amuziĝi”. En iuj preĝejoj facile troveblas “nuntempaj diservoj” kun moderna muziko (foje eĉ repo!), malpli formalaj liturgioj kaj neofendaj prediketoj de karismaj pastoroj en ĝinzo.

En la mondo de pli maturaj homoj, definitive malfortiĝas la eklezioj de la tradiciaj konfesioj. Samtempe rapide disvastiĝas nova speco, kiu celas ne nur varbi novajn kredantojn sed ankaŭ delogi malkontentajn membrojn de ties mortantaj preĝejoj. Ĉar plejparte sendependaj, ili rajtas elekti proprajn kredarojn kaj taŭgigi la enhavon de diservoj laŭ bontrovo. Bone komprenante ke aparte plaĉas al modernaj homoj amuziĝi, ili utiligas scenejojn kun grandaj ekranoj, altteknikaj lum- kaj sonsistemoj kaj similaj aferoj por okazigi

verajn spektaklojn. “Laŭdbandoj”, kun gitaroj, drumoj, elektronikaj klavaroj kaj solistoj, prezentas la muzikon, zorge elektitan por laŭgrade intensigi la spiritajn sentojn ĝis la kerna prediko kaj poste malstreĉi ilin survoje al satiga fino. Krom la diservoj, tiuj preĝejoj proponas ĉiuspecajn aktivigaĵojn al siaj membroj en ege neformala, senstreĉa familia etoso. Nun ekzistas pli ol 1 800 “megapreĝejoj” (tiuj kun pli ol 2 000 membroj) en Usono, multaj kun satelitaj filioj.



La Good News Club provas cerbolavi infanojn en lernejoj

Plidensigas la kristanan etoson ankaŭ gravega subtena elemento: aktiva industrio kiu tre efike disvastigas la evangelian mesaĝon per celtrafaj elsendoj, libroj, filmoj kaj videoj. Pli ol 1 600 radio-stacioj kaj televidkanaloj en Usono programas nur religian enhavon, kiu inkluzivas ĉiuspecajn predikojn—aparte de fifame trompemaj televidaj evangeliistoj—bibliajn studojn, filmojn, prelegojn kaj kristanan muzikon. Furoras diskuthoroj kun gvidanto kiu traktadas aktualaĵojn, popularkulturajn temojn kaj politikon laŭ religia vidpunkto. Amaso da novtipaj “kristanaj aŭtoroj” verkas tre

sukcesajn novelojn kaj romanojn kun religiaj temoj por legantoj de ĉiu aĝo. Simile sukcesas aro da kristanaj muzikistoj, kiuj disponigas albumojn kaj videojn por kontentigi tre diversajn gustojn. Per tiuj rimedoj milionoj da ĝisostaj kristanoj povas senĝene fortikigi siajn proprajn kredojn, interkonatiĝi kun homoj kun similaj sintenoj kaj laŭvole izoli sin, kvazaŭ en bobelo, for de la ĉeŝflujo de la cetera socio.

Tiu nuntempa socio montras sin pli ol iam antaŭe saturita de kristanismo, rezulto faciligita lastatempe de novaj teknologiaj iloj kaj la plirapidiĝanta forronĝado de la longe fortika muro inter eklezio kaj ŝtato. Aldone al la subfosaj politikaj kaj jure truditaj ŝanĝoj, nun ekzistas eĉ pli timiga minaco: Mike Johnson, la ĵus elektita prezidanto de la Ĉambro de Reprezentantoj, kiu havas la povon decidi ĉu leĝprojekto estu traktata de la Ĉambro aŭ mortu atendanta. Li fiere anoncas, “Mi estas engaĝiĝinta kristano kaj mia fido forte influas ĉion kion mi faras”. Laŭ

Johnson, “Estas centra premiso de la Biblio ke Dio inventis civilan regadon”, kiu estas “donaco al la homaro en falinta [pro pekoj] socio”. Al tiuj kiuj volas pli bone kompreni lin, li proponas: “Iru, prenu Biblion de sur via breto kaj legu ĝin. Tio estas mia mondrigardo”.

Kompreneble troviĝas ankaŭ multaj bonkoraj kaj bonfaraj “tradiciaj” kristanoj en Usono, kiuj strebas sekvi laŭeble la moralinstruojn de Jesuo kaj samtempe allasi ke aliaj homoj faru siajn proprajn decidojn rilate vivmanieron kaj kredaron. Tiaj homoj tamen nun staras en la dua vico, malantaŭ la netoleremaj kristannaciistoj, kiuj insistas ke ĉiuj akceptu iliajn ideojn pri konvena konduto kaj iliajn leĝojn rilate civilan vivon. Nuntempe la potenco de la zelotoj pli kaj pli videbliĝas, kaj ŝajnas ke ili nur atendas, iom senpacience, “sian momenton”. Se la kongresa voĉdonado de 2024 rezultigos Respublikajn plimultojn en ambaŭ ĉambroj, kun Mike Johnson ĉe la stirilo, ili havos ĝin.



Katolikismo ne tiom fortas en la Lisbona metropolo

Luís Ladeira (Portugalio)

Lisbono, okazejo de la katolikaj Mondaj Tagoj de la Junularo 2023, estas la malplej katolika regiono de Portugalio. Tion malkaŝas studo el 2019 pri religia identeco, kiu samtempe reliefigas, ke ateistoj kaj agnostikuloj estas pli edukitaj ol religiemuloj.

Ĉirkaŭ unu miliono kaj duono da katolikaj pilgrimantoj el la tuta mondo ariĝis en Lisbono je la fino de la unua semajno de aŭgusto 2023. Lisbono iĝis oportuna loko por propagandi la katolikan religion kaj helpi la eklezion lukti kontraŭ sia nuna malfavora reputacio pro pedofiliaj skandaloj. Sed kio pri la katolikismo kaj cetera religio en Lisbono mem?

La lasta grava studo pri religiaj identecoj farita en Portugalio, enkadre de privata fondaĵo FMS, aperis en julio 2019. La studo analizas specimenon de la loĝantaro de la Areo Metropola de Lisbono (AML) (preskaŭ 3 milionoj da homoj) koncerne identecon kaj religiajn praktikojn, kaj konkludis ke ĉi tiu estas la portugalia regiono, kiu havas malplej da katolikoj kaj enhavas la plej altan procentaĵon de eksterlandaj loĝantoj (7,3%) ĝenerale nekatolikaj. Nuntempe, laŭ la studo, 54,9% de AML-loĝantoj estas katolikaj - proporcio, kiu multe kontrastas kun la nacia nivelo, kiu, en 2011, estis 79,5%. Koncerne aliajn religiojn, 5% de



Lisbono, ĉefurbo de Portugalio (Placo Markizo de Pombal)

AML-loĝantoj estas protestantoj; 1,3% estas Atestantoj de Jehovo; 0,8% estas islamanoj; 0,7% estas budhanoj; 0,5% estas ortodoksaj kristanoj; 0,5% apartenas al alia kristana konfesio, kaj 0,4% apartenas al aliaj nekristanaj religioj. Koncerne tiujn, kiuj apartenas al neniu religio, 4,9% estas indiferentaj pri la religia dimensio; 6,9% estas agnostikuloj kaj 10% ateistoj. La plej esprimplena nombro tamen estas tiu de kredantoj, kiuj ne identiĝas kun iu religio: 13,1%.

La studo ankaŭ klopodis karakterizi la malsamajn religiajn komunumojn de la AML laŭ aspektoj kiel kultaj praktikoj kaj socidemografiaj trajtoj. Koncerne la eduknivelon, la studo konkludis, ke inter ateistoj, agnostikuloj kaj nereligiaj kredantoj troviĝas la plej alta procento de homoj kun magistriĝoj kaj doktoriĝoj. Laŭ la studo, 13,7% de AML-ateistoj havas magistriĝon aŭ doktoriĝon; same 9,4% de agnostikuloj kaj 9,9% de nereligiaj kredantoj. Tiuj nombroj reprezentas pli ol duoblo de la valoro registrita inter katolikoj: nur 4,7% havas tiujn nivelojn de klerigado. Samtempe 3,8% da protestantoj havas magistriĝon aŭ doktoriĝon. Inter islamanoj, 9,7% havas tion. En la ceteraj kristanaj konfesioj - kiuj reprezentas 0,5% de la AML-loĝantaro - 20,6% havas tiun eduknivelon. La diferenco evidentiĝas ankaŭ laŭ alia vidpunkto. Dum nur 1,5% de agnostikuloj kaj 2,5% de ateistoj kompletigis nur la unuan ciklon de Baza Edukado, ĉe katolikoj tiu cifero estas 21,5%, ĉe evangeliistoj kaj protestantoj ĝi estas 10,7% kaj ĉe islamanoj 26,3%. Ankaŭ laŭ profesia nivelo, la plejmulto da specialistoj kaj teknikistoj troviĝas inter agnostikuloj kaj ateistoj.

La studo ankaŭ rigardas la kutimojn de AML-loĝantoj dum semajnfinoj. Ekzemple, la esplorado konkludas, ke la procentaĵo de homoj, kiuj ĉeestas religiajn servojn dum semajnfinoj (11,4%) estas pli malalta ol la procentaĵo de tiuj, kiuj laboras (18,6%), kiuj promenas (33,3%), kiuj legas librojn aŭ gazetojn (21,5%), kiuj aĉetumas (37,1%), kiuj sportumas (11,5%) aŭ kiuj prizorgas la domon (34,4%). Tamen pli da homoj partoprenas en religiaj servoj ol en kulturaj eventoj (6,4%).

Datumoj eltiritaj el la gazeto Observador, Lisbono 2/7/2019



La surpriza (sed nur imaga) potenco de ateistoj en Usono


Bill Maxey (*Usono*)

Lastatempe en Usono oni atentigis pri tiu ĉi afiŝo kiu aperis en iu socia komunikilo, nome de iu Allison Crew:

Hodiaŭ ĉe la nutraĵvendejo, komplezema junulo proponis sian helpon por meti miajn skatolojn da akvoboteloj [en mian aŭtomobilon]. Mi diris al li, ke li sendube estas bona kristana ulo, kaj li diris al mi, ke li estas ateisto. Mi tuj eksentis, ke estas malvarma demoni estaĵo en la parkejo. Ekde tiam mi konstante preĝas kaj riproĉas la diablon, sed mi restas kun la timo, ke tiu demono saltis sur min. Mi bezonas ke ĉiuj preĝ-militistoj kuniĝu kun mi por retropuŝi tiun ĉi diablon en inferon. Mi scias ke Dio diras “ne timu”, sed mi timas.

Malgraŭ la preskaŭ absurda reago esprimita en la rakonto, ĝi fakte povus servi kiel metaforo por la ĝenerala sento kiun havas multaj religiaj homoj en Usono rilate ateistojn. Ĉi tia pensmaniero karakterizas dekmilojn da usonaj kristanoj kies pastoroj, laŭ sia interpretado de la fantazia biblia libro Apokalipso, kredigas al ili ke la fortoj de la bono kaj la malbono senĉese interbatalas en nia ĉiutaga mondo kaj ke la diablo kaj ties malbonintencaj sekvantoj ne nur ekzistas sed aktive insidas kontraŭ ili.

Klare ili konsideras ateistojn ne simple evitindaj enkarniĝoj de demonaj fortoj sed potencaj, minacaj estaĵoj kun rektaj ligoj al la infera militistaro. Bonsance, tiu “malbonvola” potenco de la helpema ateisto ekzistas nur en la menso de la fanatikuloj. Tiu de la kristannaciistoj—same malbonvola—tamen, estas tute reala.



Humanistoj kritikas la blasfemo-leĝojn de Pakistano

En la 54-a sesio de la Konsilio de Homaj Rajtoj de UN, Humanists International (internacia federacio de humanismaj organizaĵoj – red.) faris deklaron, en kiu ĝi esprimis maltrankvilon pri la malboniĝanta situacio en Pakistano rilate al maltoleremo kaj malamo. Ĝi precipe kritikis ties kontraŭblasfemajn leĝojn, kiuj kondukas al kriminala kaj ekstertribunala persekutado, kaj proponis ŝanĝojn al la Leĝo pri Oficialaj Sekretoj.

La deklaro estis farita de Abid Mehmood, pakistana advokato, kiu laboras kun la Humanisma Societo de Pakistano, organizaĵo ligita al Humanists International, por batali kontraŭ la misutiligo de religio por persekuti religiajn malplimultojn kaj senreligiulojn.

La deklaro komenciĝis per esprimo de maltrankvilo pro la pliiĝo de atakoj kontraŭ kaj religiaj kaj nereligiaj malplimultoj en Pakistano. Tiujn atakojn ebligas la plifortigo de la kontraŭblasfemaj leĝoj de la lando komence de ĉi tiu jaro. Tiuj leĝoj, ĉi-jare kaj ankaŭ pli frue, estas menciitaj kiel la kaŭzo de eksterleĝaj atakoj kontraŭ homoj akuzitaj je blasfemo. Ili estis bruligitaj vive, pafmortigitaj dum kortum-procesoj, kaj hakitaj sur la

flanko de vojoj, inter aliaj formoj de eksterleĝaj mortigoj.

Kontraŭ tiu fono, la deklaro notis, ke la proponitaj amendoj al la Leĝo pri Oficialaj Sekretoj prezentas kaŭzon por granda maltrankvilo. La amendoj donus al la spionservoj de Pakistano vastajn potencojn trudeniri la hejmon de iu ajn civitano kaj lin/ŝin deteni. Ili ankaŭ ampleksigus la leĝon al elektronika kaj neskribita komunikado. Humanists International rimarkis, ke tiuj evoluoj estas maltrankviligaj en si mem. Sed kunigitaj kun la menciitaj kontraŭblasfemaj leĝoj, ili lasas religiajn kaj senreligiajn minoritatojn en tre danĝera situacio.

Artikolo el la retejo de Humanists International (<https://humanists.international/news>) tradukita de la redakcio de Ateismo.



La Turo de Pakistano en Lahoro kune kun moskea minareto

ATEISMO

ENHAVO

Vorto de la Redaktoro

Ateisma Vivo

Rezisto al konvertado	3
Vidpunktoj pri religia varbado (4 kontribuoj)	6
Virtualaj ATEO-kunvenoj: ateistoj kaj moralaj reguloj	8
La skeptikisma movado kaj esplorado pri pseŭdoscienco	10

Pripensigoj

Funebro tre proksima: inter religieco kaj laikeco	13
Mirakloj laŭ la scienco	15

Legantoj Reagas

Bibliaj legendoj en la lernejo	20
Dio, kiu postulas adoradon, kaj la veto de Paskalo	22
Reago al "Pri la nocio de Dio"	24

Ĉirkaŭ la Mondo

Ke Usono (r)estu kristana nacio	25
Katolikismo ne tiom fortas en la Lisbona metropolo	28
La surpriza (sed nur imaga) potenco de usonaj ateistoj	30
Humanistoj kritikas la blasfemo-leĝojn de Pakistano	31

Bonvolu sendi viajn artikolojn al la redaktoro:

ateismo.bulteno@gmail.com

Por informoj bonvolu skribi al la sekretario:

anna.lowenstein@esperanto.org

Prezidanto: Giridhar Rao, Barato

Vicprezidanto: Dominique Simeone, Francujo

Sekretario: Anna Lowenstein, Britujo

Redaktoro: Nyegosh Dube, Pollando

Lingva kontrolo: Anna Lowenstein, Britujo

Kasisto: Dieter Rooke, Svislando

Grafikisto: Maurizio Giacometto, Britujo

Jarkotizo: 10 eŭroj (A-landoj) / 8 eŭroj (B-landoj)

Por ricevi la paperan revuon, bonvolu aldoni 2 eŭrojn

Konto: **ateo-y** ĉe UEA